



EKO 2015-22 sendita el Budapeŝto, la 23an de junio.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI, TEJO, la gazetaro, retlistoj kaj pliaj.

Interreta TV-elsendo pri la malfermo de la UK en Lillo!

La unuan fojon en la historio de la Esperanto-movado, estos eblo spekti la solenan malfermon de la Universala Kongreso de Esperanto per interreto.

LKK de la UK en Francio provos filmi kaj interrete elsendi la solenan eventon. Ĉar tia elsendo okazos la unuan fojon kaj mankas ankoraŭ spertoj pri la realigo, povas aperi diversaj teknikaj problemoj – kvankam oni kompreneble klopodas solvi kaj eviti ilin.

La rekta adreso por spektado estos dissendata per retroŝto al la dezirantoj, kiuj registras sian retadreson ĉe la paĝo:

<http://blog-bilinguisme.fr/produits/uk2015malfermo/>

La solena inaŭguro de la Universala Kongreso komenciĝos je la 10-a horo CEST, la 26-an de julio! – Detalaj informoj pri la UK estas troveblaj ĉe: <http://uea.org/kongresoj/>



35 aliĝoj por la KER-sesio en Lillo

Laŭdinda nombro da komunumanoj kaptas la okazon proponi sin por KER-ekzamenoj dum la jubilea UK en Lillo; preskaŭ ĉiu volas provi la parolan ekzamenon. Restas eblo ankoraŭ anonci vin. Trovu informojn ĉe:

<http://edukado.net/ekzamenoj/ker/lillo>

Sesioj okazos dimanĉe, tuj post la inaŭguro, kaj vendrede tra la plimulto de la tago, kun la kongresferma sabato en rezervo.

Ĝemelurba agado pluiras

Ĝemelurbaj bultenoj 52 kaj 53 alvenis, kune kun alvoko por fotoj el la multaj ĝemelurboj de Lillo, cele al ekspozicio pri ĝia ĝemela programo. Tiuj ĝemelurboj de Lillo estas: Rotterdam (Nederlando), Valladolid (Hispanio), Erfurt (Germanio) kaj Wrocław (Pollando); Lillo plie havas partneran rilaton kun Köln (Germanio), Torino (Italio), Esch-sur-Alzette (Luksemburgio), Liège (Belgio), Leeds (Britio), Saint-Louis (Senegal), Kharkiv (Ukrainio), Safed (Israelo), Nablus (Palestina Aŭtonomio), Oujda (Maroko) kaj Haifa (Israelo).

Monda Eduka Forumo – aktivejo por UEA

Ni jam detale raportis pri tio en EKO 20 (sed kun erara indiko en la temlinio pri la urbo: temis ne pri Seulo sed Incheon). Jen nia estrarano Lee Jungkee kun forumano el Bangladeŝo:



Jen li (Lee) kun
samnomulo, d-ro Lee
Young-koo, la
prezidanto de Korea
Esperanto-Asocio, kiu
kunorganizis la
partoprenon kaj budon,
kune kun UEA.



Estrara Raporto pri 2014

Vi jam ricevis kun EKO 21 la dek-paĝan ilustritan version de la oficiala raporto de la Estraro de UEA pri la jaro 2014. La 4-paĝa neilustrita versio same ekzistas en la retejo de UEA, en la TEKO. Tio estas simpla represo de la kvar paĝoj el la junia revuo *Esperanto*, kies kovrilon ni montras apude.

Nun en finpreparo estas ampleksa sed maloficiala versio de la raporto. Tion vi ricevos per la sekva EKO-komuniko.

Sesa Afrika Kongreso de Esperanto (AKE)

“Nome de Afrika Komisiono de UEA, mi havas plezuron oficiale anonci al vi, ke ANEB, la landa asocio en Burundo, estas la kunorganizanto de la sesa Afrika Kongreso de Esperanto (AKE 6). Tiu ĉi kongreso okazos en la urbo Rumonge, sur la bordo de Lago *Tanganyika*, de la 13-a ĝis la 20-a de aŭgusto 2016 sub la temo: “Esperanto, ilo por paco kaj disvolviĝo”.



La preparoj por la kongreso en Rumonge kreskas, la laboro akumuliĝas kaj la kunsidoj same kiel traktoj multobliĝas. LKK disdonis la taskojn, regule renkontiĝas kaj starigis taŭgajn metodojn por certigi sekuran, bonan kaj sukcesan organizadon de la evento. La Afrika Komisiono de UEA atente kontrolas la farendajn laborojn de la LKK-anoj.

Ekde la naŭdekaj jaroj Afrikaj Kongresoj estas organizataj en malsamaj afrikaj landoj kadre de la siatempa Afrika Agado de UEA, sed ekde 1996 devis ĉesi, pro financaj malfacilaĵoj. Tamen, en Kotonuo, Benino, jarŝanĝe de 2013-2014 okazis la 5a AKE, kaj tie okazis decido pri regula okazigo.

AKE estas la plej grava internacia renkontiĝo ene de Afrika Esperantujo, kun ampleksa programo. Ĝia ĉefa celo estas kunigi esperantistojn el la tuta Afriko dum pluraj tagoj por ke ili amuziĝu, laboru kaj interkompreniĝu, uzante Esperanton. Tiu sesa renkontiĝo rolos ankaŭ kiel rendezuo por plibonigi klubajn kaj asociajn vivojn kaj vikle diskuti pri la estonta agado en la kontinento.

Ne ĉiuj povas ĉeesti la kongreson kaj per tio rekte kontribui por ĝia riĉigo. Sed vi ja povas subteni la aranĝon, ĉu plusendante tiun ĉi komunikon al lokaj gazetoj kaj diskutlistoj, ĉu donacante mem monsumon al la Fondaĵo Afriko ĉe UEA kun indiko ‘AKE 2016’. Bonvolu senhezite helpi por la vigligo de Esperanto en Afriko. Ni estos dankemaj al vi.

Iomete koncizigita el teksto de Adjévi Adjé, Kunordiganto de Afrika Komisiono de UEA.

Vortoj: 666

Legu pli pri Rumonge el vikipedio. Gratulon pro tiu teksto, kiu cetere estas pli ol 20-oble pli longa kaj enhaviĉa ol la teksto en la angla! <https://eo.wikipedia.org/wiki/Rumonge>

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Malnovaj komunikoj ekde jan. 2014: www.uea.org/vikio/Ĉefpaĝo kaj serĉu sub la sekcio ‘Komunumo’.